# ESPERANTO EN AFRIKO

Oficiala bulteno de la Afrika Komisiono de UEA

14-a jaro. n-ro 40(2020:1)

*Karaj legantoj,*

*En la du unuaj monatoj de la jaro 2020, same kiel en la periodo iom pli antaŭe, multaj Esperanto-renkontiĝoj kaj agadoj okazis kun sukceso en diversaj regionoj de la kontinento dank' al la kunlaboro kaj klopodoj de esperantistoj.*

*Ĝuste tiu ĉi nova numero de la bulteno prezentas tiujn realigojn: tutkontinentan kongreson jarfine en Buĵumburo, Tagon de Esperanto-libro, ankaŭ konatan kiel la Zamenhofa Tago, seminarion por virinoj en Benino, movojn en Tanzanio, kongreson en Togolando, seminarion de la Goma Esperanto-Klubo, kunvenon en Ganao k.t.p. Eblas krome legi en la bulteno anoncon de la Afrika Komisiono de UEA pri la lando de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto kaj multajn aliajn iniciatojn de esperantistoj, precipe de la afrikanoj por ĉiam pli alten teni la verdan standardon en la hejmkontinento de la homaro.*

*Certe la realigo de tiuj ĉi agadoj montras ankaŭ la meritojn de la amikoj de Afriko kaj de diversaj ali-kontinentaj helpoasocioj, kiuj prenis sur sin akompani afrikajn aktivulojn kaj lokajn movadojn en la unuopaj landoj.*

*Dankon kaj bondezirojn al ĉiuj!*

***La redakcio***

*****************

## Miora: mi gvidis virinan kunsidon kaj kuraĝigis ilin

Miora Raveloharison, e-istino kaj pastorino el Madagaskaro, estas la sola virino el la kvar membroj de la Afrika Komisiono kiuj partoprenis en la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) en Buĵumburo, Burundo, inter la 21-a kaj 27-a de decembro 2019 .

Kaj ŝi sentis egan plezuron: *mi partoprenis en la AKE. Mi ĝuis la kongresan etoson en Buĵumburo: kongresejan verdaĵon, kunestadon kun ĝentilaj kongresanoj, ekskursojn al la termika akvejo sur la monto Mugara, Tanganjika lago ktp.* Pluiras ŝia rakonto: *mi povis rekte konatiĝi kaj babili kun la enkontinentaj kaj alimondpartaj geesperantistoj, ĉar mia hejmlando estas insulo, ni do malofte povas renkontiĝi kun esperantistoj alilandanaj. Partoprenantoj kongresumis kun ĝojo kaj amo. "Amo" iĝis nia kongresa frapvorto plenan semajnon.*

Miora ne nur profitis la kongreson, sed ankaŭ aktive kontribuis al la riĉigo kaj realigo de ĝiaj programoj, *mi povis ankaŭ ludigi kongresanojn per kunigaj kaj rapid-refleksaj ludoj. Dum la tago de la Kristnasko mi aparte lernigis kristnaskajn kantojn al geamikoj. Mi gvidis virinan kunsidon, dum kiu mi per prelego kuraĝigis ilin pli aktive kaj diligente agadi por Esperanto.*

Fine, la malagasa komisionanino dankeme kaj feliĉe konkludas, *dankon al la AK-anoj, al la tuta kongresa organiza teamo kaj al ĉiuj partoprenintoj, ĉar ni ĉiuj kune realigis mojosan renkontiĝon kun ĝojo kaj amo. Esperebl... ĝis la 8-a AKE!*



**Miora Raveloharison**




Kio impresis min, estis la afableco de la organizantoj de la kongreso, precipe de Jérémie Sabiyumva kunlabore kun Adjé Adjévi el Togolando. Tiuj ĉi nokte kaj tage devis respondi al premaj bezonoj, demandoj kaj solvi problemojn de kongresanoj en kaj ekster la kongresejo. Ili kun aliaj lokanoj kaj eŭropaj gastoj entuziasme kunlaboris egalnivele en harmonio kaj intensa interkompreniĝo.

La tuttaga ekskurso okazis al la monto Mugara, 80 km malproksime de Buĵumburo. Tie preskaŭ ĉiuj ekskursanoj banis sin en la nature varmega akvo. Ni poste enbusiĝis al la lago Tanganjika, kie ĉiuj ekskursanoj fotiĝis, kaj mukekumis ĉe la lagbordo. Mukeke estas speciala bongusta fiŝo, kiun la fiŝkaptistoj kaptas el la lago kaj vendas. Temas pri la unua ŝatata fiŝo en la orienta parto de Afriko. Okazis ankaŭ koncertoj, dancoj, diversaj ludoj ktp.

La plej arda deziro de e-istoj en Afriko, ĉie en Esperantujo, estas ke iam estontece okazu la UK en Afriko, por ke ni certiĝu ke Esperanto ne estas eŭropece farita lingvo por eŭropanoj, kvankam lulile kreita de eŭropano, kun la nomo L. Lazaro Zamenhof. Pro la problemo de nericevo de vizoj fare de afrikanoj pli bone estas nun komenci pripensi kreante projektojn, iniciatojn por okazigi UK-on en Afriko.

Kio ankoraŭ impresis min krom la sinteno de Hasano, kiu montriĝis ĉiam saĝa kun pacigaj vortoj, estis la okazigo de matena tridekminuta diservo kun Miora el Madagaskaro. Dum tiu ero ni kune predikis, kantis kaj preĝis kune kun aliaj ĉeestantaj kristanoj en la ĉambro *blanka*.

La 7-a AKE estis kulture sukcesa, etose paca kaj ankaŭ bone planita kaj organizita. Estis rezolucio kun ege gravaj punktoj. Esperantistoj engaĝiĝis kunlabori lok-, naci- kaj internaciskale en la limo de siaj ebloj por disvastigi nian verdan lingvon Esperanto. Koran dankon al niaj burundaj samideanoj, kiuj gastigis la kongreson! Estu fieraj ni ĉiuj, ĉar la kongreso disvolviĝis glate kaj mojose.

**Mana N. Brinson (DR Kongo)**

Estis vere granda ĝojo por ni esti kun vi, via partopreno en la kongreso estis valora kaj dankinda, ni lernis multon de vi. La E-movado en Burundo ĉiam memoros vian gravan viziton en nia lando, ni ne forgesos vian kontribuon, vi vere grave valoris dum via restado en Burundo, okaze de la 7-a AKE. Estis plezuro por mi kune kongresumi kun vi.

La kongreso enhavis multajn programerojn, en kiuj ni profitis lerni, sperti unu de la alia tra la programeraj interŝanĝoj. Ni diskutis, ni babilis, ni amikiĝis kaj ekkonis unu la aliajn. La 25-an de decembro estis tuttaga ekskurso, ni vojaĝis kaj vizitis diversajn lokojn, inter aliaj, la E-centron en Burundo. La ekskurso realiĝis en bela etoso kun kantoj, fotadoj, ĝojo...

Kelkaj samideanoj planis partopreni la 7-an AKE kun ni, sed ne povis pro diversaj kialoj. Kelkaj el ili sendis al ni salutmesaĝojn el diversaj partoj de la mondo. Ni kun ĝojo ricevis la mesaĝojn amikajn kaj varmajn. Ni amas vin kaj same bondeziras al vi sukceson. Mi esperas ke iam ni havos okazon denove renkonti unu la aliajn en movadaj eventoj.



**Gilbert Ndihokubwayo (Burundo)**



Unue, gratulojn pri la AKE. Ĝi estis elstara konferenco kaj vi tre bone organizis ĉion. Mi provos raporti pri la konferenco al la vasta mondo.

**Rakoen Maertens (Belgio)**

Dankon kara Adjévi. Ni ĝojis havi vin en Burundo. Certe vi estas la bona ekzemplo, ĉar vi estas laborema.



**Twalibu Bikirantanganwa (Burundo)**

# Rezolucio de la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto

De la 21-a ĝis la 27-a de decembro 2019 okazis en Buĵumburo, Burundo, la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA, en kiu partoprenis 135 geesperantistoj el Belgio, Burundo, DR Kongo, Italio, Kameruno, Madagaskaro, Svislando, Tanzanio, kaj Togolando. La kongresa temo estis: "Verdigo de la kontinento Afriko". Post la diskutoj, la kongreso alvenis al la sekva rezolucio:

*La Afrika Komisiono verku kaj disponigu al la afrikaj esperantistoj modelon de efika varbmetodo. Tiun efikan varbmetodon landaj asocioj kaj kluboj traduku al respektivaj lokaj lingvoj por informado.*

*Afrikaj esperantistoj dediĉu sian tempon kaj energion por plifortigi la varbadon kaj la instruadon de la internacia lingvo.*

*La Afrika Komisiono helpu al lokaj, landaj kaj regionaj organizoj okazigi Esperanto-eventojn.*

*Afrikaj esperantistoj uzu Esperantajn vortojn por nomi siajn projektojn.*

*Afrikaj esperantistoj organizu/partoprenu lokajn lingvofestivalojn/konkursojn.*

*Afrikaj esperantistoj strebu starigi movadon en landoj sen Esperanto-movado.*

*Afrikaj esperantistoj varbu simpatiantojn de Esperanto tiel ke ili fariĝu amikoj de Esperanto.*

*Rilate al UK en Afriko, la kongresanoj aprezis la ideon okazigi UK-n en Afriko por la unua fojo en la horizonto de 2023. Por sukcesi, la kongresanoj petas la Afrikan Komisionon de UEA helpi du landojn respektive en la orienta kaj okcidenta Afriko pretigi klarajn invitproponojn al UEA.*

*La kongresanoj kuraĝigas afrikajn esperantistojn inviti aliajn internaciajn Esperanto-eventojn en la horizonto de 2023, por plifaciligi al afrikanoj partopreni plurajn Esperanto-eventojn.*



Kunkantado de la himno La *Espero*

Kelkaj partoprenintoj de la 7-a AKE



*La AMO-seminario estas grava kaj necesa programo por plifortigi la movadon en Afriko. La AMO-seminario okazu almenaŭ unu fojon jare en Afriko kaj estu pritraktitaj (aldone al la programo) kiel subtemoj: lertigado pri verkado de gazetaraj komunikoj, libroverkado, filmfarado, fotado, muziko ktp.*

*La Afrika Komisiono kaj la estrarano de UEA en Afriko partoprenu en lokaj, landaj, regionaj kaj kontinentaj lingvaj renkontiĝoj.*

*Diverseco de opinioj kaj kulturoj estas bona atuto por la movado. Afrikanoj harmonie kunlaboru por progresigi la movadon sen konsideri personajn konvinkojn.*

*La Afrika Komisiono instigu afrikajn esperantistojn aliĝi al UEA, regule legi la revuon* Esperanto *kaj la Gazetarajn Komunikojn kaj partopreni en la konkursoj.*

Farita en Buĵumburo, la 26-an de dec. 2019

**La 7-a AKE**

La revuo *Esperanto* 1342(2) februaro 2020 aperigis multajn materialojn pri la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) sur siaj paĝoj 27, 28, 29 kaj 30.

Tamen eblas ankoraŭ havigi materialojn dumkongresajn per la ĉi-subaj ligiloj. Ekzemple, por:

spekti prikongresan filmeton:
*https://www.youtube.com/watch?v=-bRgnS0ys3l&feature=youtu.be*

rigardi aŭ elŝuti dumkongresajn fotojn:
*https://drive.google.com/drive/u/2/folders/1PQCOkhqF5Zc914gZGNql8_A9SGwtrM-D*
*https://drive.google.com/drive/u/2/folders/1pGJyi-lwNzHcKnDFu_wL1ODx4_rUxY8u*

legi la kongresan libron:
*https://www.esperanto-afriko.org/Libro%20de%20la%207-a%20AKE.pdf*

# Celebre al la Tago de Zamenhof en Kinŝaso...

En la salono *Yenge* ĉe la sidejo de la Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (DKEA) en Kinŝaso, DR Kongo, la landa sekcio de ILEI celebris etosoplene la Tagon de Zamenhof kun 20 geesperantistoj el diversaj grupoj kaj partoj de la ĉefurbo Kinŝaso la 15-an de dec. 2019.

Ĉio komenciĝis kun la laŭokaza vorto de s-ro Florent Ntoto, sekciestro, kiu faris skizan prezenton pri ILEI kaj ĝia konga sekcio. Estis do okazo por prezenti la bilancon de la sekcio rilate al la agado en la finiĝanta jaro, kies atingoj estas: organizo de konversaciaj rondoj, prelegoj, ekspozicioj kaj perfektigaj kursoj.

La agado ĉe la E-klubo Junaj Esperantistoj de la Nacia Pedagogia Universitato (JEUPN) konsistigas unu el la plej imponaj atingoj. Fakte, celante revigligi la grupon surbaze de rekomendoj de unu el la konversaciaj rondoj, la konga ILEI-sekcio gvidis regule E-kursojn por la membroj de JEUPN. Tiu ĉi instruagado de la sekcio povas same okazi en aliaj lokaj E-kluboj, kiuj interesiĝas pri ĝi.

Dum la renkontiĝo memore al la 160-a naskiĝdatreveno de Zamenhof okazis ankaŭ pluraj prelegoj pri la vivo de Zamenhof far s-ro Jackson Mafuila Mavomo, la historio de la E-movado far s-ro Jean Bosco Malanda kaj la konga E-literaturo prezentata de s-ro Batangu Mpesa. Ankaŭ diskutoj, deklamo de poemoj,



Partoprenintoj de la aranĝo

spekto de filmo kaj muziko agrabligis la etoson de la evento.

Dankesprimoj estis prezentitaj al ĉiuj kiuj iel helpis aŭ kunlaboris en la plenumado de la kurantjara agado, nome al la prezidanto de ILEI, tiu de DKEA, la nuna kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA kaj al ĉiuj aliaj.

Ankaŭ la alfrontitaj malfacilaĵoj dum la jaro estis prezentitaj. Ili ĉefe rilatis al financaj rimedoj, kio malhelpis la konkretigon de multaj planitaj agaderoj. Temas, ekzemple, pri la seminario por kursgvidantoj kaj aranĝo de ILEI/UEA-ekzamenoj surloke.

Post koktelo kaj vizito al la ekspoziciitaj E-libroj, la renkontiĝo finiĝis per familiaj fotiĝoj de ĉiuj kunvenintoj kaj registro de komuna videa salutmesaĝo al la 7-a Afrika Kongreso de Esperanto.

**Florent Ntoto**

# .... kaj en Lokossa, Benino


Kelkaj partoprenintoj kun Cyprien

La Tago de Zamenhof ne estis prisilentita en Benino, pli precize en Lokossa ĉe la Afrika Centro Mondcivitana (ACM) la 15-an de dec. 2019.

Laŭ Cyprien Aguiya, volontulo ĉe ACM, *la naskiĝdatreveno de Zamenhof estas speciala Tago por ni kaj por la E-kulturo. Por ni estis la tago por dokumentado kaj babilado pri la vivo de Zamenhof. Tiel ni povis dokumenti la librojn kune kun la infanoj, kiuj sekvas E-kursojn en la centro ACM; vive saluti kaj komuniki kun francaj kaj alilandaj e-istoj per fejsbuko. Ĉe la fino de la kunveno ni ĉiuj kunfotiĝis.*

# Tanzania Esperanto-Asocio survoje al registriĝo

La dato de la 8-a de dec. 2019 restos grava en la historio de la Tanzania Esperanto-Asocio (TEA). Estis la tago dum kiu deko da tanzaniaj gee-istoj renkontiĝis en unu sama loko por diskuti enlandajn aferojn pri Esperanto por povi redoni novan elanon, kiu pli stimulos la emon lerni kaj kunlabori por Esperanto kadre de la landa asocio.

La kunveno okazis en Kahama ĉ. 300 km de la urbo Bunda, kie okazis la 6-a Afrika Kongreso. La partoprenantoj venis el diversaj partoj de Tanzanio: Daresalamo, Tanga, Aruŝa, Mwanza, Kahama, Bukoba kaj Bunda kun unu komuna celo, nome revizii la statuton de TEA. Ne ĉiuj esperanistoj povis veni al la kunsido, tamen ĉiuj regionoj, kie estas Esperanto, reprezentiĝis, ĉar antaŭe okazis en la vacapa komunik-listo pretiglaboroj. Cetere tio ĉi fruktodonis ĉar rezultiĝis la sukcesa kunveno.

Dumkunside okazis atenta trastudo de artikolo post artikolo, modifproponoj same pri la formo kiel pri la enhavo de la prezentita statuto. Ĉe la fino kaj sub la rezervo pri amendoj, la kunvenintoj per aplaŭdo aprobis unuanime la novan statuton de TEA.


Grupa foto de la kunvenintoj

La kompletigo de la membroj de la estraro disvolviĝis en gaja, harmonia kaj interkonsenta etoso. La provizora estraro de TEA nun konsistas el: 1) prezidanto: Mramba Simba (Bunda); 2) vicprezidanto: Paul K. Kusaya (Bunda); 3) sekretario: John E. Magesse (Muleba); 4) vicsekretario: David Mapengo (Kahama); 5) kasisto: Jyrous Eliakim (Mwanza) kaj aliaj membroj: Francis Gendo (Daresalamo), Nyambona Masamba (Daresalamo).

La ceteraj demandoj kaj diskutoj koncernis esence la agadprogramon de TEA, la efektivigotajn administrajn klopodojn por akiro de la ŝtata agnosko de TEA.

**Paul K. Kusaya**

# Tanzaniaj gelernantoj studas Esperanton

Mardon kaj ĵaŭdon ĉiusemajne Esperanto estas instruata unu horon ĉe la mezgrada lernejo Kaigara en Muleba, Kagera, Tanzanio. La E-kurson gvidas la ŝtata instruisto John Magesse, ekster la oficiala lernoprogramo.

La nombro de la kursanoj komencis kreski intertempe al 69 kursanoj post futbala okazigita de la Muleba Esperanto-Klubo la 7-an de januaro 2020. Jam la kursanoj lernis dum la lecionoj pri la alfabeto de Esperanto, substantivoj, adjektivoj, artikolo kaj pluralo.


Antaŭ la kursanoj staras John Magesse

La kursanoj multe ĝojas aŭdi pri la internacia lingvo, kiu helpos al ili komuniki kun aliaj popoloj tutmonde. La E-instruado plu–okazos tra la tuta kuranta lerno-jaro.

John E. M. kun sia patro Barnabas Magesse planas havi en estonteco propran lernejon, kie Esperanto povos esti instruata oficiale kiel unu el la klerigaj lernobjektoj. Tial ili bonvenigas subtenon de esperantistoj per donacoj kaj per libroj. Ili ankaŭ esperas vizitojn de eksterlandaj gastoj por kuraĝigi al internacia edukado.

Por havi pliajn informojn oni bonvolu skribi al: *magessa.john@yahoo.com.*

**John E. Magesse**

# Seminario por virinoj en Kotonuo, Benino

Temas pri plena semajno en formo de studcela kunloĝado: kapabligo de virinoj en gvidaj roloj; malkovro kaj eklernado de E-o; legado kaj skribado de la fonua lingvo, la ĉefa benina lingvo.

Estis la tria tia semajno kun homogena grupo el la universitatnivelaj junaj virinoj. Venis subteno de privatuloj al la NRO Scio Sen Bariloj (SSB). Rezulto estas, ke SSB povis akcepti 20 partoprenantinojn. Biologio, merkatiko, sociologio, antropologio, geografio, agrikulturo, informadiko, kemio, librotenado, juro, asekuroj estas iliaj studobjektoj. Ili nun studas aŭ jam finstudis kaj serĉas laborpostenon.

Lunde la 28-an de oktobro 2019 okazis la malfermo kun diversaj prelegoj. La prezidanto Privas Tchikpe prezentis la asocion Scio Sen Bariloj kaj ĝiajn diversajn agadojn en Benino, Togolando kaj Senegalo; SSB kontribuas al la subteno de kreskigo de scioj en iuj kampoj kaj por iuj publikoj. Mireille Grosjean prezentis la tri aksojn de la seminario, parolante pri arbo: radikoj (fonua lingvo), trunko (lertigado de virinoj en gvidaj roloj) kaj branĉoj (Esperanto por malfermi sin al la mondo) kaj menciis la *Internacian*


Kelkaj el la partoprenintoj

*Jaron de indiĝenaj lingvoj*, kiu disvolviĝas en 2019 kaj kies celo kongruas kun unu el la tri aksoj de la seminario. Ŝi laŭte legis du mesaĝojn de antaŭaj partoprenintinoj.

La ĉefino de la 10-a distrikto de la urbo Kotonuo, S-ino Monique Konhonou, vic-urbestrino, partoprenis la malfermon kaj parolis kuraĝige al la partoprenantinoj. Venis du reprezentantoj de la ŝtata oficejo pri instruado en la naciaj lingvoj kaj la du instruistinoj de la fonua lingvo dungitaj de SSB.

La laboro pluiris ĝis sabato matene. Notindas, ke pro tia agado kaj aliaj klopodoj Privas Tchikpe ricevis diplomon de UEA pri *Elstara Agado* dum la UK 2019 en Finnlando.

**Mireille Grosjean**

# Nia afero tamen moviĝas en Goma, DR Kongo

La Goma E-klubo (GEK), sub la superrigardo de s-roj Emile Malanda kaj Alphonse Waseka Kamango, organizis E-seminarion en la urbo Goma, DR Kongo, pri la temo *Reformo de la E-movado en Goma* ĉi-jare en januaro, la 26-an.

La seminarianoj sekvis plurajn komunikaĵojn de talentaj e-istoj. En la unua s-ro Nickson Kasolene raportis pri la 7-a Afrika Kongreso, en kies laboroj diligente partoprenis 7 membroj de GEK. 3 el ili eĉ krome kandidaĝis kaj trapasis sukcese la dunivelan ekzamenon de ILEI/UEA. En la dua parto s-ro Emile Malanda elstare instruis pri la diversaj aspektoj por havi allogan kaj interesan kluban vivon. En la tria parto li prezentis pri la Monda Helpo en Afriko, kies afergvidanto en la kontinento estas la kongano Arlain Kizeyidioko.


Kelkaj el la seminarianoj

Okazis inter la seminarianoj kaj Jérémie Sabiyumva kaj François Hounsounou viva babilado perfejsbuke. Plia salutmesaĝo venis de s-ino Elisia Martins de Oliveira el Brazilo. La vortoj de eksterkonganoj aparte altigis agrable la etoson kaj helpis movi antaŭen la laborojn.

Malgaŭ la pluvo, 31 personoj el kiuj 21 viroj kaj 10 virinoj, ĉeestis la seminarion. Ĉio disvolviĝis en tiel bona etoso, ke oni sugestis ĉe la fino la okazigon de aliaj gravaj renkontiĝoj en Goma kaj aparte petis la okazigon de AMO-seminario en proksima estonteco.

La estraro de GEK konsistas el: 1) prezidanto: Salama P. Jacques, 2) sekretario: Nickson Kasolene; 3) kasistino: Merveille Batumike; 4) kulturoj: Mathieu Kimona; 5) financa konsilanto: Joelle Ngoy kaj 6) instruado: Eric Baeni.

**Nickson Kasolene**




# Esperanto-kongreso en Togolando

La togolanda E-asocio UTE organizis sian 27-an nacian kongreson de Esperanto kun kvardeko da partoprenantoj en la lernejo Instituto Zamenhof (IZo) la 20-an kaj 21-an de dec. 2019.

Dum la unua tago, jam ĉirkaŭ la 12-a horo la kongresanoj ekalvenis al la kongresejo. De la 14-a ĝis la 15-a okazis la unua parto de la kvizo, kiu allogis multajn gelernantojn de IZo.

La kultura vespero beligis la tutan kongresejon kaj la kvartalon de la 18-a ĝis kelkaj minutoj post la 20-a horo. Dum tiu ĉi programero la kongresanoj prezentis diversajn E-kantojn kaj ludojn laŭ nia togolanda tradicia ritmo. Ni ne forgesu mirindajn prezentaĵojn de kelkaj danc- kaj skeĉgrupoj. Vere estis agrabla kaj neforgesinda vespero, dum kiu la partoprenantoj dancis kaj faris multajn ludojn sub okcidentaj kaj afrikaj, principe togolandaj muzikoj. Ili ŝatus daŭrigi ĝis la mateno, sed necesis ripozi por fortiĝi por la futbalmaĉo la sekvantan tagon.

Sabate jam je la 6-a matene la futbalmaĉo okazis inter nia teamo kaj la teamo de la firmao CIMTOGO, unu el la enlandaj entreprenoj, kiuj produktas kaj vendas cementojn. La ludo finiĝis ĉirkaŭ la 9-a kun la rezulto: E-teamo 1 kaj CIMTOGO 1. Rimarkindas, ke dum la maĉo la E-teamo multe suferis, kvankam ĝi unua enpafis la golon.

Poste muzika etoso bonvenigis la kongresanojn de la futbalejo al la kongresejo. S-ro Elom K. Attaglo, prezidanto de UTE, per siaj bonvenigaj vortoj, malfermis oficiale la kongreson post la kunkantado de la togolanda kaj Esperanta himnoj. Konstatinte, ke la horo por la tagmanĝo jam pasis, ĉiuj kongresanoj tuj preferis plenigi la ventron kune antaŭ ol daŭrigi la ceterajn programerojn. Meze de la manĝado okazis la dua parto de la kvizo, aŭkcio, loterio, demandoj kaj respondoj, dum kiuj kongresanoj gajnis multajn Esperantaĵojn kaj premiojn festajn.

Dum la ĝenerala asembleo la kongresanoj aŭdis la raportojn de la kunlaborantaj organizaĵoj de UTE, nome de ĝia junulara sekcio JOTE fare de Dzifa Gbeglo, de Togolanda ILEI-sekcio TIS fare de Koffi Gbeglo kaj de TIETTI-Instituto de


Partoprenintoj de la 27-a TEK

Esperanto en Togolando (TIETTo) fare de Koffi Doumegnon. La kongresanoj krome pristudis la agadplanon 2020 de UTE. Okazis ankaŭ diskuto pri novaj strategioj por revigligi la togolandan E-movadon kaj pri iniciativoj rilate al la instruado de Esperanto en la universitato de Lomeo, al aktivaj membroj de Amnestio Internacia en Togolando. Fine la asembleo decidis kunveni la 25-an de januaro 2020 por unuflanke taksi la laboron de la speciala komisiono pri revigligo de la E-movado en Togolando kaj aliflanke, por fiksi la diversajn kunvendatojn kaj kotizojn por la nova jaro.

Por malmortigi la renkontiĝon, grupan fotiĝon faris la kongresanoj kiel kutime dum tiaj gravaj kunvenoj. Poste, pluokazis la kvizo, aŭkcio kaj loterio kun diversaj ludoj. Ĉio poste bone finiĝis en gaja etoso.

**Kossi Gadoufia Edah**

# Kunveno en Ganao

Okazis kunveno de la ganaa e-isto Alfred Kobina Arthur kaj Julio Calegari (brazilano) kun la respondeculoj de la lernejo *Lutheran* en Akrao, Ganao. La diskutoj rilatis al la promocio de ĉukpilko kaj instruado de Esperanto en la koncerna lernejo.

La respondeculoj de *Lutheran* salutis la ideon kaj nun estas starigita laborgrupo por daŭrigi la diskutojn, kies rezulto estos prezentita kaj diskutota en plena kunsido kun ĉiuj agantoj.


De maldekstre Alfred K. A., Julio C. kaj respondeculoj lernejaj

# Jam elektita la lando de la 8-a AKE

Post Buĵumburo en Burundo 2019, la sekva Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) okazos en Senegalo. Tiu estas la unuanima elekto de la ok-persona Afrika Komisiono de UEA vendrede, la 31-an de januaro 2020.

Pri la elekto de la lando por gastigi la AKE-n respondecas la Afrika Komisiono de UEA, kies kunordiganto, François Hounsounou, dissendis jarŝanĝe 2019 malferman alvokon al ĉiuj lokaj E-movadoj kaj landaj asocioj pri la invito de la tutkontinenta renkontiĝo principe por la jaro 2022. Venis 5 kandidatiĝoj, nome de Senegala Esperanto-Asocio (Senegalo), Esperanto-klubo de David (Ruando), Demokrata Kongolanda Esperanto-Asocio (DR Kongo), Esperanto-klubo de Ruthuro (DR Kongo) kaj Ganaa Esperanto-Movado (Ganao). Nur la du unuaj kandidatiĝoj alvenis en la fiksita limdato, dum la tri lastaj venis post la fiksita periodo.

Respekte al la decidoj de la 5-a Afrika Kongreso de Esperanto de UEA: *Afriko estas granda kontinento; pro tio necesas dividi ĝin laŭ geopolitika organiza modelo por ebligi la migradon de Esperanto-renkontiĝoj…*, ĉiuj membroj de la Afrika Komisiono, sub la rigardo de Jérémie Sabiyumva, elektis okazigi la 8-an AKE-n en Senegalo.

Tiu decido ankoraŭ praviĝas en tio, ke venis ene de la limdato neniuj aliaj invitproponoj el aliaj regionoj de Afriko krom el la okcidenta (Senegalo) kaj orienta (Ruando kaj Goma) partoj. Sed en tiu ĉi lasta parto de la kontinento ĵus divolviĝis la 7-a Afrika Kongreso. Sekve ne eblus do realigi sinsekve la renkontiĝon en la sama regiono.

Estos interese kaj historie aranĝi la AKE-n en Senegalo, ĉar ĝis nun ankoraŭ ne okazis kongreso en tiu lando, kiu tamen havis dudekon da individuaj membroj de UEA en 2019! Sed antaŭe, Senegala Esperanto-Asocio devos laŭeble baldaŭ prezenti al la Afrika Komisiono detalan planon por la kongresa organizo, kiel memorigindas: *la kandidata landa asocio liveros la informojn pri la kongresloko, kongresejo, kongresa dato (konforme al la loka lerneja kalendaro), nomlisto kaj kontaktinformojn de ĉiuj membroj de la LKK por la faciligo de la ceteraj paŝoj en la pretiglaboroj.*

La Afrika Kongreso de Esperanto estas la plej prestiĝa Esperanto-kunveno ene de la afrika Esperantujo. En ĝi partoprenas afrikaj esperantistoj sed kutime ankaŭ alikontinentaj por interkonatiĝo cele al informo pri Esperanto. La renkontiĝo okazas ĉiun trian jaran en alia regiono afrika, kutime en decembro, kunlabore inter la Afrika Komisiono kaj unu el la kontinentaj landaj asocioj aŭ grupo de lokaj aktivuloj, sub la egido de Universala E-Asocio.

**Adjévi Adjé**

**La malagasa liceo *Bouba* ricevis la viziton de la ŝtata TV-M. Tiu ĉi venis viziti kaj filmi en la klasoj la E-lecionojn sub la gvido de Rabevazaha Désiré la 10-an de februaro 2020.**

**La tuta atingo montras la meriton de la licea direktorino.**

**Ĉiam antaŭen en Madagaskaro!**


***Esperanto en Afriko*** estas trimonata oficiala periodaĵo de la Afrika Komisiono de UEA pri la Esperanto-movado en Afriko.

**Redaktis:** Adjévi Adjé,
06 B.P. 61807, Lomé, Togolando;
tel.: +228 902 57 549, 995 72 623.

Kion faras via landa asocio aŭ via loka E-klubo en via loĝloko? Bonvolu verki kaj sendi artikolon pri tio. La redakcio akceptas ankaŭ fotojn. Bonvenaj komprenebla estas ankaŭ sugestoj, konsiloj, komentoj por la plibonigo de la bulteno al: *adjevia@gmail.com*.

**Limdato por la 41-a n-ro:** la 30-a de aprilo 2020.



**Membroj de la Afrika Komisiono de UEA (2019-2022):**

**Kunordiganto:** S-ro François Hounsounou, **Benino**
**Vickunordiganto:** S-ro Gilbert Niyukuri, **Burundo**
S-ro Joel Muhire Ndaziboneye, **DR Kongo**
S-ino Miora Raveloharison, **Madagaskaro**
S-ro Moses Gbetogo Opa, **Niĝerio**
S-ro Viktor Ntonto, **Kameruno**
S-ro Adjévi Adjé, **Togolando**
S-ro Cedrick Irakoze, **Kenjo**


Pli da informoj rilate al la afrika movado haveblas per: ***www.esperanto-afriko.org.***